

ESPERANTO

TRIUMFONTA



Eldonantaro:
D-ro L. Zamenhof, Warszawa (Varsovio)
W. M. Page, adv., Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gilli North, Barcelona
Teo Jung, Köln (Kolonia)
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bankdirektoro, Kaunas (Kovno)

Administrado:
Horrem bei Köln, Germ.
Poŝtekonto Köln 70663, por Teo Jung, Horrem.

Redaktoro:
Cefredaktoro: Teo Jung.
Kunredaktoroj: J. Fethke, H. Hurler, Max Butlin.
Literatura red.: Zanoni.

Kunlaborantoj inter la Esperantistaro de la tutmondo.

Semajna

Abonon ni akceptas ne por fiksita tempo (jaro, monatoj) sed por nombro de ET-numeroj. Oni sendu iun sumon, kaj ni liveros ET ĝis elĉerpiĝo de la sumo. Pri finiĝonta abono ni informas. Oni pagu ne per poŝtmandato, sed per ŝtataj monbiletoj en rekomendita letero, eventuale per ĉeko je germana banko.

Kun senpaga monata „Revuo“

La prezo de unu numero estas por la landoj:


Aŭstra 800 Kr.	Ĉeĥoslov. 1.20 Kr.	Germana 40 Mk.	Jugosl. 1.60 Din.	Portug. 0.50 Esk.
Belga 0.50 Fk.	Finna 1.30 Fmk.	(Germanoj abono ĉe sia poŝtloko)	Kanada 0.06 Dol.	Rumana 3 Lei.
Brita 3/4 Pc.	Francan 0.50 Fk.	Italaj 0.70 Lit.	Nederland. 0.15 Hfl.	Sveda 0.24 Kr.
Bulgara 3 Levul	Hispana 0.50 Pes.	Japana 0.10 Jen.	Norvega 0.30 Kr.	Svisa 0.30 Fk.
Dana 0.20 Kr.	Hungara 30 Kr.		Pola 120 Mk.	U. S. A. 0.06 Dol.

Baltikanoj kaj rusoj demando la prezon ĉe sia Abonelo. Aliaj landoj pagu egalvaloron de 0.50 Fr. Fk. aŭ 1 stampitan Respond-Kuponon.

Neŭtrala

Listo de Abonejoj en diversaj landoj sur paĝo 4 Por Adresangoj ni kalkulas du numerojn de la abonkonto.

Dumviva Abono kostas la prezon de 400 numeroj. Anoncoj kostas po cm² 0.10 svizan frankon (aŭ ĉe antaŭpago 30 gmk); rebato laŭ interkonsento. Specialaj prezoj por eksterteraj aŭ specialaj numeroj.



Numero 109 :: Antwerpen, Barcelona, Edinburgh, Kaunas, Köln, Paris, Warszawa :: 5. Novembro 1922.

La granda Premiado de Esperantaj Infanoj.

(Spertoj de Esp. Instruistaro rilate al la konkurso.)
De W. Hahn, Gohlis-Dresden.

„Esperanto, lingvo de espero! Jam la nomo esprimas la fakton, ke nia celo estas atingata nur en estonteco. Pripensu tion Esperantistoj! La venonta generacio, nuntempe ankoraŭ infanoj aŭ ĝeĵunuloj, decidis, ĉu nia lingvo venkos kaj daŭros. Zorgu, ke nia junularo jam frue konvinkigu pri la valoro de nia ideo, ke la scipovo de nia lingvo estu al ĝi trezoro por la praktika vivo. Nur plenuminte ĉi tiun devon, vi estos certaj, ke ili ne lam parolos pri vi kiel pri utopistoj sed kiel pri pioniroj de venka ideo. Sekve vi laboras por via propra afero, se vi propagandas Esperanton inter la junularo.“

Ĉi tiuj frazoj mi skribis por la kongreslibro de la VIII-a Germ. Esp. Kongreso en Stuttgart 1913. Intertempe Esperanto eniris en multajn ĉiusepacajn lernejojn, kaj ĉe la propagando de nia movado oni pli kaj pli konsideras la fakton, ke la junularo reprezentas la venkon aŭ pereon de Esperanto. La saman ideon certe havis s-o van Heek aranĝante la premiadon por Esp. infanoj. Kiam mi legis en „Esperanto Triumfonta“ pri lia grandanima oferemo, mi vokis: „Jen granda helpa faro!“ Kaj mi estis prava; tion nun sperte scias ĉiuj instruistoj, kiuj instigis stajn ĝelernantojn, partopreni la konkurson. Jen miaj bonaj spertoj:

Dolĉigi jamaniere la ofte sengustan manĝaĵon de la lernejoj, de la novaj vortoj kaj gramatikaj formoj, por ke la lernado estu ĝoja laboro, tio ja estas la sekreto de la sukceso ĉe la Esp. instruado al infanoj kaj ankaŭ la rimedo ligi la junajn ĝelernantojn kun la afero. Tial estas grava tasko de Esp. instruistoj, ke ili ĉiam serĉu okazojn, kiuj utilas al tiu ĉi celo. Dank' al la helpo kaj oferemo de aliandaj ĝesamideanoj tiuj klopodoj ne estas vanaj. Mi povas rakonti, ke miaj Esperantaj gekonatuloj, precipe nederlandaj, skotaj kaj danaj, depost 14 jaroj trege helpis krei la ĝustan Esperantan vivadon en miaj klasoj! Ili korespondadis kun la infanoj, ebligis Esperantajn festojn per mondonacoj, vizitis la klasojn kaj fotografe ilin kaj gastigis la junajn ĝesamideanojn en siaj landoj.


Tia felika okazo estis ankaŭ la konkurso por infanoj, kiun aranĝis kaj publikigis s-o van Heek en ET. Leginte la alvokon, mi opiniis, ke multaj Esperantaj instruistoj en la tuta mondo instigos

siajn ĝelernantojn partopreni. Por ne esti inter la lastaj, mi kunvokis la infanojn dum la liber-tempo, kaj dum kelkaj tagoj ili verkis pri simplaj memelektilaj temoj. Fervorege ili laboris, dezirante gajni la valoregajn libropremiojn. La sukceso estis granda dank' al la milda kritiko de la afabla oferemulo. 26 ĝelernantoj povis ricevi la premiojn kaj ĉiu havis la permeson mem elekti librojn reprezentantajn la valoron de 150—200 gmk. Kiam mi povis disdoni la belajn Esp. librojn, la ĝojde la infanoj estis vere grandega, kaj mi deziras, ke s-o van Heek estu vidinta la felicajn vizaĝojn de la junaj ĝesamideanoj. Miaj ĝelernantoj apartenas plejmulte al nerikaj familioj. La altegaj prezoj malpermesas al ili aĉeti librojn. Des pli granda estis ilia ĝojo pri la altvaloraj donacoj. En la loka gazeto mi publikigis malgrandan raporton pri la bona sukceso de la infanoj, kiu efektis, ke jam nun 25 infanoj anoncis sian partoprenon ĉe la nova kurso komenonta 1923. La intereso de la gepatroj pligrandiĝis, kaj ankaŭ en la apudaj vilaĝoj oni demandis la lernejestrojn pri Esp. kursoj. Sekves-o van Heek tre propagandis en mia tuta regiono. Samtempe li montris al miaj ĝelernantoj, ke nia afero estas jam nun tre utila kaj havas ankaŭ por ili praktikan valoron.

Kun la Esperanta lingvo mi instruas al la infanoj ankaŭ la Esp. ideojn, la devojn de homamo kaj frateco. La vereco de tiaj instruaj vortoj estas plej bone pruvata per faroj egalaj al la supre cititaj agoj de samideanoj kaj de la oferema s-o van Heek. Al li ni Esp. instruistoj ŝuldas

multegan dankon, ĉar li estas plej bonvena helpanto ĉe nia instruado.

Estas tri specoj de propagandistoj: kelkaj propagandas parolante, laborante, verkante, instruante; aliaj helpas per mono la progreson de nia afero; la tria speco kaj laboras, kaj ofertas monon. Tia sukcesplena propagandisto, laboranta kaj oferanta, estas s-o van Heek. Al li apartenas la kora danko ne nur de la multaj diverslandaj infanoj ricevintaj la valorajn premiojn, sed ankaŭ de la tuta Esperantistaro.



Vizito de s-ano Vonago (Vladivostok) al s-anoj Akira Nakanome kaj Ing. Kanitaro Takahaŝi en urbo Hiroŝima (Japanujo). Dum la multo s-anoj Nakanome kaj Takahaŝi vizitis la urbojn Harbin kaj Vladivostok. Ili faris multe da propagando kaj grandan impreson kiel bone parolantaj Esperantistoj. En tiu rilato ili estis unuaj pioniroj de Esp. propagando en Manĝurio kaj apudmara lando el Japanujo.

Sen-senca babilajo.

Sajne iuj personoj havas intereson je tio, ke la venontara Universala Kongreso en Nürnberg malsukcesu. Unu post alia aperas obskuraj diraĵoj, kun la evidenta celo, delimitigi la samideanojn je partopreno al la kongreso kaj efiki malsukceson de la kongreso mem.

En la franca gazetaro oni povas legi, ke la kongreso de

Nürnberg ne okazos, ĉar la bavara registaro ne donos al eksterlandanoj permeson por vojaĝi Bavarion. Sciigo tute ne fundita. Certe ekzistas ia leĝo pri rifuzo de permeso envojaĝi, sed estas iutkompreneble, ke — ĉe internaciaj kongresoj — oni faras escepton. Do, ni povas pro tiu leĝo eĉ supozii pli grandan viziton al la kongreso, ĉar multaj personoj intencantaj viziti Bavarion volonte profitos de la ŝanco, ricevi permeson envojaĝi okaze de la kongreso.

Alla diraĵo estas, ke la urbo Nürnberg ne povus loĝigi kelkmilojn da kongresanoj. Sen-senca babilajo! Industria grandurbo kun preskaŭ

duonmiliono da enloĝantoj estas certege provizita per sufiĉe multaj gastejoj.

Laste ni aŭdis novan sensencaĵon: okazis akra disputo inter la Loka Komitato; la prezidanto, Prof. Ledermann, eksciĝis. Mi persone partoprenis antaŭ nelonge en Nürnberg kunsidon de la L. K., kaj n. l. povis konstati plenan interkonsenton kaj ne ofte troveblan unuanimecon. Kaj ankoraŭ en letero de 22. oktobro Prof. Ledermann certigas min, ke la nekontroleblaj kaj obskuraj diraĵoj estas „prenitaj el la aero“, ke en la L. K. K. regas plena unuanimeco kaj modela harmonio. Prof. L. aldonas, ke jam lia konscio pri devo ordonas al li resti sur sia poŝtano.

Mi do petas ĉiujn sincerajn samideanojn, je la intereso de la bona sukceso de la XV-a, ne plu kredi tiajn sensencajn babilajojn, kiuj subfosas la konfidon al la L. K. kaj detruas la laborojn de la L. K.-anoj. Ni estu singardaj kaj kontraŭbatalu la nevideblajn malamikojn, ignorante la de ili intence dissematajn falsajn sciigojn kaj plene konfidante al la fervore laborantaj preparantoj de la XV-a. Cetere, ET estas la oficiala organo de la L. K., kaj en ĝi oni trovas plej rapide ĉion sciindan pri la kongres-aranĝoj. Do, tralegu ĉiam atente la cirkulerojn de la L. K. kaj la ceterajn komunikojn pri la XV-a, anstataŭ aŭskulti la subfosajn diraĵojn dissematajn de malamikoj de Esperanto! Zorgu ĉiu je sia parto, per konfido kaj subteno, per diskonigo de la vero, antaŭ ĉio per plejeble baldaŭa aliĝo, ke la kongreso de Nürnberg fariĝu denove brila manifestado por la ideo de lingvo internacia, ankoraŭ pli brila ol ĝis nun okazintaj Esp. kongresoj, por ke la mondo konvinkigu, ke nia movado ne nur jam ne estas ignorebla, ke ĝi ne nur fakte ekzistas, sed ke ĝi eĉ kreskas de jaro al jaro, kaj ke la tempo ĉiam pli alproksimiĝas, kiam oni devos, vole nevole, konfesi ĝian plenan venkon.

Pliiriĝo de nia literaturo.

La neaperanta „Literatura Aldono“ de ET kaj la senpaga „Revuo“.—Verkoj eldonitaj de ET kaj Butlin & Jung. — Taŭgaj manuskriptoj bezonataj.

Multaj samideanoj esprimis sian bedaŭron, ke la „Literatura Aldono“ de ET, apenaŭ aperinta, ne plu aperos. Ili diras, ke la projektita „Revuo“, eĉ se ĝi estus pure literatura, ne povos anstataŭi la „Literaturan Aldonon“. En la „Lit. Ald.“ ili vidis bonan komencon pliiriĝi la Esp. literaturon laŭ maniero profitiga por eldonistoj kaj legantoj. Profitiga por la eldonistoj, ĉar li tuj ricevus monon

La Konfliktoj.

Kara sinjoro redaktoro!

Certe ankaŭ vi legis en la gazeto, ke la konfliktoj nun estas en la Oriento. Mi ne scius tion, ĉar kiam mi estas Esperantisto, mi legas nur malofte nacilingvajn gazetojn, kaj por tio mi iomete malscias, kio okazas en la mondo. Sed iuvespere — mi ĵus estis verkanta novan „Elegion“ por via gazeto — mia edzino, kiu legadis mian „Intelektia ĵurnalo por Naivurbo kaj ĉirkaŭaĵoj“, ĝenis min per la vortoj:

„Jen, Kristiano, jen io pri...“
„Dum la najtingale kantis En l' arbar' de arboj plena, Dum kukolo dolĉe...“ mi deklamis laŭ mia manuskripto.
„Ĉu vi ne aŭdis? Mi diris ion.“
„Dum kukolo dolĉe... dolĉe... ha, ĉiujfoje vi ĝenas min, kiam mi ĵus havas belan ideon!“
„Jen io pli interesa ol viaj ideoj, aŭskultu:...“
„Kukolo dolĉe... ha, nun mi ne plu scias la rimon je „kantis“, vi...“
„Sufiĉas fine!“ kaj ŝi kolere fortiris mian manuskripton, „kiam mi parolas al vi, vi lasu viajn skribaĵojn; aŭskultu: ĵus mi legis denove ion pri la konfliktoj.“
„Konfliktoj?... Konfliktoj?... Kio estas... ha, jen mi rememoras. Vi estas prava, mia karulino, tio kompreneble interesas min.“ Mi formetis mian kraljonon. „Ĉu ili denove faras bruadon en la mondo?“
„Eĉ grandan! Ili estas nun en la Oriento, jen!“
Ŝi transdonis al mi la ĵurnalon. Fakte:
„La Konfliktoj en la Oriento“ mi legis la dikliter presitan surskribon.
„Ĉi tiuj malbenindaj konfliktoj!“ mi diris.
„Strange! Antaŭ nelonge ili estis ankoraŭ en

Rusujo kaj nun en la Oriento! Ili do vagadas en la tuta mondo. Nu, kiel stas ilia afero? Ĉu ili havas sukceson?“

„Pri tio la gazeto raportas iomete malklare. Ĉar ĝi parolas pri angloj, francoj, italoj, grekoj, turkoj, armenoj, oni ne povas certe diveni, kun kiu la konfliktoj estas ligitaj.“

„Malsaĝa demando! Estas evidente, ke ĉiuj ĉi nomitaj nacioj unuigis por batali kontraŭ la sovaĝaj konfliktoj.“

„Kaj Dio helpu, ke la eŭropanoj baldaŭ venku. Cetere, Kristiano, kie estas la Oriento? Mi scias efektive nenion pri tiu lando.“

„La Oriento? Ho, tio estas ne lando, tio estas terparto. Mi supozas almenaŭ.“

„Sed kie?“
„Kie? Atendu... en... en... ha, en la momento mi ne plu rememoras.“

„Tre bone! Ĉiukaze vi fanfaronas pri viaj scioj kaj tamen vi ne povas respondi la plej simplajn demandojn.“

„Pripensu: se oni maljuniĝas, oni fariĝas iomete forgesema.“

„Ho, vi havas admirindan lertecon „maljuniĝi“, se vi ne trovas pli taŭgan senkulpigon.“

„Trankviliĝu! Pro kio ekzistas libroj? Jen la atlaso; helpe de ĝi ni baldaŭ trovos la landon. Jen la tabelo de l' enhavo. Unue: Terpartoj: Eŭropo, Afriko, Azio, Ameriko, Aŭstralio, ni kune legis, sekvante per la fingroj la liniojn.“

„Kiel mi pensis,“ diris mokeme mia edzino, „do terparto ĝi ne estas, malsaĝulo.“

„Do ni vidu inter la „landoj!“ Jen: Anglujo, Belgujo, Francujo, Germanujo, Rusujo — Ĉinujo, Japanujo — ĉu la vorto ankoraŭ ne estas aperonta? — Egiptujo, Palestino — Meksiko, Usono — pro diablo! — jen la fino, Oriento ne enestas.“

Ni rigardis unu la alian, ŝi kolere, mokeme, preskaŭ triumfe, mi konfuze, senhelpe kaj malsprite...“

„Nu...?“
„Nu...?“

„Kristianeto,“ ŝi fine turnis sin al nia ĵus eniranta filo, vi ja havis tiel bonan lernejeston pri viaj geografiaj konoj, ĉu vi povas diri al ni, kie estas la Oriento? Espereble vi estas pli saĝa ol via patro.“

Atentu, sinjoro, „ol via patro“ ŝi diris, sin mem ŝi tute forgesis menci. Ho, la virinoj!

Ĝis nun ni pritraktis nur Eŭropon en la lernejo, Kristianeto respondis, „pri Oriento ni lernis ĝis nun nenion.“

„Ha, mi jam vidas, li sekvas sian patron koncerne malsaĝecon. Nu, — kaj malamika rigardo trafis min — ĉu oni povas atendi ion alian de l' filo de stultulo?! — Por kio vi do iradas lernejon, ŝi realparolis kolere nian senkulpan idon, „ŝajnas, ke vi konstante dormadas dum la instruado!“

„Ĉu vi mem ne iris lernejon, patrino, aŭ ĉu vi ankaŭ dormadis?“ li trafe respondis.

Mi admiris lian kuraĝon. Bedaŭrinde li tuj ekhavis vangofrapon.

„Poriru, impertinentulo!“
Ekplorante li rifugiĝis malantaŭ mian dorson. „Estas negrave, Eŭlallo,“ mi penis repaciigi mian edzinon, „certe la Oriento estas tre malproksime de ĉi tie, do ni ne bezonas timi la konfliktojn. Morgaŭ mi iras en la bibliotekon por trakti la koncernajn librojn kaj certe...“

„Ne necese, mi demandos la edzinon de nia najbaro, li estas tre klara homo. Ho, pro kio mi devas havi tiel malspitan kaj malkleran edzinon!“

„Kaj mi tiel malpaceman kaj maljusteman edzinon,“ mi... volonte estus dirinta.

„Sed por reveni al la konfliktoj,“ Eŭlallo daŭrigis, „ili certe estas stranga nacio kaj tre militema. La bona Disinjoro gardu nin kontraŭ ili. Ili ĉiujfoje estas tie, kie regas malpaco, mortigemo, bruilgemo, revolucio, ribelo, malsato kaj milito, ĉu ne? Pro kio ili ne restas en sia lando?“

„Mi supozas, ke ili vivadas per siaj militoj kaj rabadoj. Paca kaj laborema vivo ne plaĉas al ili. De tempo al tempo ilia lando fariĝas tro malvasta al ili, kaj tiam ili atakas aliajn popolojn.“

„Do ili similas iomete al la lamaj hunoj? Kiel ili aspektas?“

„Ho, mi imagas ilin grandstaturaj sovaĝaj homoj, ĉiam armataj de kapo ĝis piedoj, furioze alrajdante sur same sovaĝaj ĉevaloj kontraŭ la malamikon, tiel ke la tero sub ili tremadas. Mi opinias, ke la nura aspekto jam kaŭzas teruron.“

„Eble ili havas diablosimitajn maskojn antaŭ siaj vizaĝoj, ŝajnas, ke ili estas ligitaj kun la inferano.“

„Certe ili estas sendisciplinaj kaj senkultura nacio.“

Estimata sinjoro redaktoro! Ĉi tiu senorda, migrema, vagemaj kaj militema gento de l' konfliktoj ĉiam interesis min. Parte kun admiro, parte kun teruro mi ĉiujfoje legis la raportojn pri iliaj faradoj. Jen, en ĉiuj partoj de la mondo ili batalumas, jen ĉi tie, jen tie. La unuan foton mi eksciis pri ili en mia junaĝo, kiam ili bataladis en Ĉinujo. Mi tre bone rememoras, ke kun froto-tremo mi legis la surskribojn en preskaŭ ĉiu gazeto:

„La Konfliktoj en Ĉinujo.“

Tiam mi arde deziris, ekscii ion pli detalan pri ili. Ĉar en la lernejo dum la priĝeografiaj kaj prihistoriaj lecionoj mi neniam aŭdis ion pri ili, mi demandis mian patron. Unue li nekomprene rigardis min, poste li laŭte ekridis.

kaj ne bezonus atendi, ĝis la verko estus kom-
pleta; — kaj por la leganto, ĉar li ne bezonus
tuj pagi altan sumon por la libro, sed povus ĝin
pagi iom post iom je partopagoj, kio estus por
multaj neriĉaj samideanoj grava faciligo.

Efektive, literatura revuo neniam povas ansta-
taŭi librojn. Ĝi povas publikigi nur mallongajn
skizojn, rakontojn, fabelojn, legendojn, poemojn;
eventuale noveletojn je 2—3 daŭrigoj; sed ne
gravaĵajn verkojn de 2—300 aŭ pli da libropaĝoj.
Krome ĉiu literaturamanto ŝatas havi apartan
verkon en aparta libro; sed en revuo la longetaj
literaturaj trovaĵas diŝe en diversaj kajoj. Ce-
tere ĉiu revuo, ankaŭ literatura, baldaŭ malaktual-
iĝas, dume romano aŭ ĉefverko en aparta libro
restas aktuala por longa tempo, se ne por ĉiam.
Do, ankaŭ pro la financa sukceso estas preferen-
de eldoni bonajn librojn ol revuon; ĉar revuo
estas tute dependa de la nombro de siaj abon-
antoj, sed libroj trovas ĉiam aĉetantojn.

Tute pravaj estas tiaj rezonoj de niaj amikoj.
Kaj mi povas certigi, ke la aldonado de ĉiumonata
(cetere senpaga) „Revuo“ al ET neniel influos la
eldonadon de libroformaj verkoj per la eldonejo
de ET kiel ankaŭ per la parenca firma Butin &
Jung en Godesberg. El la eldonejo Butin & Jung
venos baldaŭ du verkoj, „Taglibro de Vilaĝpedelo“
kaj „Oni ridas“; aliaj sekvos. Kaj la eldonejo
de ET intencas en januaro aŭ februaro 1923 kom-
enci la eldonadon de serio da — laŭeble origi-
ninalaj — Esperantaj verkoj, precipe romanoj, je
amplanko de 200—400 paĝoj. Ili aperu unue en
monataj aŭ duonmonataj kajoj po 32 paĝoj kaj
estu aboneblaj je ankoraŭ difinitaj favoraj kon-
diĉoj, kaj post finpreso ĉiu verko estu aĉetebla
en formo de bela, moderne aranĝita volumo. Tia-
maniere, mi esperas, la eldonejo de ET povos
aperigi ĉiujare 2—3 taŭgajn originalajn Esp. ro-
manojn aŭ bonajn tradukojn de ĉefverkoj el naĉaj
lingvoj, se — jen la ĉefa antaŭkondiĉo — ĝi trovas
konformajn manuskriptojn.

Talentaj samideanoj, kiuj havas intereson inter-
rilati kun la eldonejo de ET pri eldono de ori-
ginala aŭ alia 200—300paĝa romano de ili verkita
resp. verkota, bonvolu sin turni, kun precizaj
detaloj, al la administracio de ET en Horrem bei
Köln. Teo Jung.

La laborolernejo).

De rektoro Trarbach.

En Germanio multaj celadas, enkonduki la
laborlernejon. Laŭ raportoj de gazetoj ĝi estas
aranĝata ekz. en Neukölln ĉe Berlino. La social-
istoj postulas ĝin en sia programo.

Plena komleta laborlernejo ne ekzistas ĝis
hodiaŭ en Germanio. Tial multaj personoj ne
konas ĝian esencan kaj gravecon; krome la nomo
„laborlernejo“ ne scilgas ion precizan pri ĝia
tasko kaj celo. Kontraste de ĝi la hodiaŭa lernejo
estas nomata „lern-lernejo“ (germane: Lernschule).
Sed estas lernote ankaŭ en la laborlernejo, kvan-
kam ne tiom, kiom en la hodiaŭa lernejo, kaj
estas laborate ankaŭ en tiu ĉi lernejo, nome
korpe kaj spirite (ekz. en gimnastikaĵo, akrobado,
kalkulado).

En kio do ekzistas la esenco de la
nova lernejo? Komence tio estis instituto,
zorganta nur pri la manlerteco. Sed jam en la
mezo de la 18. jarcento oni postulas ankaŭ la
spontaneco (germ.: Selbsttätigkeit) de l' lern-
antoj en la instruado; gvidate de la instruisto, ili
trovu mem la rezultatojn de l' instruo, ekz. la natu-
rleĝon en la fiziko, kaj ne lernu ilin nur parkere.
La esprimo „laborlernejo“ tiel fariĝis principo;
ĝi ne estas plu nur (instruado)-fako. Hodiaŭ ĝi
signifas lernejon, kiu zorgas ne nur pri la
managado kaj manlerteco, sed ankaŭ pri ĉiu
ebla formo de l' observo- kaj eksperiment-

* Germane: Arbeitsschule.

instruado, pri okaza instruado kaj instruado
sub libera ĉielo; sed ĉiam la lernantoj devas
labori spontanee.

Tiel elpensis tiun lernejon ekz. D-ro Kerschen-
steiner, urba lernejo-konsilisto (inspektoro) en
München. Li estis pioniro sur tiu ĉi teritorio kaj
enkondukis la laborlernejon ankaŭ en la praktikon.
La laborinstruado estas en kelkaj tiaj klasoj
instruadofako; deposedi la unua lernejaroj knaboj kaj
knabinoj lernas kudri, triki ktp.

Bedaŭrinde ankaŭ en München ne ekzistas
plena kaj memstara laborlernejo. La laborinstru-
ado estas enkondukita nur en la perfektiga lerne-
ejo (germ.: Fortbildungsschule), kiun la ĝejunuloj
vizitas de la 14. ĝis 18. jaro, en la supera (unua)
klaso de la popolaj lernejoj kaj en la 4 malsupraj
klasoj (lernejo 1—4) de knabo- kaj de knabo-
knabino-lernejo. En tiuj ĉi klasoj la knaboj kaj
knabinoj ricevas la saman instruadon; ili lernas
kudri, triki, plekti, faras objektojn el ligno, laboras
en la ĝardeno ktp. Oni elektas la faradon de
objektoj el ligno, ĉar tiuj ĉi estas uzataj multoble
dum la instruado, ĉar ili povas esti farataj precize-
ege, la materialo estas malkara, knaboj kaj knabi-
noŝoj havas grandan intereson por ili, kaj tiu ĉi
okupado donas okazon por la laborkomuneco.

Estas farataj: ŝtupetaroj, saltoŝnuroj kun teni-
loj, lignaj kuboŝ, veturiloj el fadenobobenoj kaj
tabuletoj, florkorbetoj, lignaj konstruetoj (en
laborkomuneco), cifereplatoj, seĝoj kun plektaĵoj,
krucoj, metromezuriloj, sturnejoj (pilkko-) batiloj,
gimnastikbastonoj ktp. Por la laborinstruado spe-
ciala, teknika instruisto estas necesa.

Kiel formiĝas la instruado en la ceteraj fakoj?

En la kalkulinstruado ĉiu lernanto havas en
la mano objekton por klarigi aŭ komprenigi la
kalkultaskon. Krome oni igas taksu, mezuri, nombri
en la laborejo; precipe aĉetado kaj pesado estas
ekzercataj.

Vendado. El po du lernantoj unu estas komerc-
isto, la alia aĉetanto. Se komercisto ne ekzistas,
oni donas al la nombroj la signifon de tiaj, nome
de poŝtkartoj, bulkoj, plumoj, kraĵoj, litroj,
metroj ktp.

Laboro kaj pago. La infanoj helpis ĉe la
laboro; do ili ricevas 2, 3, 10 pfenigojn po horo.
Ili formas taskojn kiel: Mi laboris 3 horojn, do
mi ricevas 3x2=6 pfenigojn ktp. Per tiaj
multoblaj taskoj kaj ekzercoj la infanoj lernas la
kalkuladon (tie ĉi la multobligadon) ludante.

Por klarigi al la lernantoj la escepton de la
naturleĝo: malvarmeco kunformas ĉiujn korpojn,
oni plenigas du bierglasojn ĝis la stampligno,
nome la unu je ordinara akvo, la alian je salakvo,
kaj metas ilin dum malvarmega vintra nokto sub
liberan ĉielon. La infanoj vidos la alian matenon:
La salakvo ne frostiĝis; sed la pura akvo glaci-
iĝis tutege, kaj la glaso krevis. La glacio staras
super la stampligno; ĝi okupas pli grandan spacon
ol la akvo.

El ĉiuj ĉi ekzemploj oni vidas, kiel en la labor-
lernejo la infanoj perlaboras spontanee siajn kondi-
ĉojn kaj sciadon. Sammaniere ankaŭ la ceteraj fakoj
estas pritraktataj en tiu ĉi lernejo. La spaco ne
permesas citi ankoraŭ aliajn fakojn.

Kial

manlaboro estas necesa por la edukado?

La anoj de tiu lernejo diras: La malnova
lernejo havigas nur unufankan kleron; ĝi precipe
formas, disvolvas memoron kaj intelekton; ĝi
malzorgas pri la produktado, kreemo de l' infano.
En la nova lernejo ili devas labori, desegni, pro-
dukti ktp.; per tio la tuta evoluo de l' homo estas
akcelata.

Generale la laboro alportis la homaron sur la
nunan altecon. Nur kiam la homoj komencis krei,
fari ilojn kaj labori per ili, la manoj estas ekzerc-
ataj, kaj la homoj estis devigataj pli mediti. Ili
estas eltrovoj de la homa intelekto; aliflanke ili
kunhelpis al la evoluo de la homa spirito.

Kvankam la konfliktoj ĝis antaŭ nelonge al
mi mem ne kaŭzis ian malutilon, mi deposedi kelkaj
tagoj malamas ilin. Ĉar pro ili mia tuta repu-
tacio, miaj edzeca kaj patrea aŭtoritato estas en
plej granda danĝero. Aŭskultu!

Dum la interparolado kun mia edzino pri la
konfliktoj nia filo, kiu estas tre sciam kaj lome-
te tro-saga, aŭskultis kun malfermitaj buŝoj kaj
oreloj. Fine li intermiksis sin per la demando:
„Diru, patro, ĉu ili ankaŭ havas kornojn sur
la kapo?“

Pro Dio, mi pensis, nun li certe demandas pri
ilia lando! — Fakte. Li mem respondis sian de-
mandon tuj aldonante:
„Kredeble! En fabellibro mi jam ofte vidis
bildojn de homoj kun kornoj. Sed, patro, kiel
nomiĝas la helmlando de l' konfliktoj?“

„Nu, Konflikto, kompreneble.“
„Kie estas ĉi tiu lando?“
„? ? ?“

„Ĉu vi ne aŭdis?“ mia edzino sin altrudis,
„Kristiano deziras scii, kie estas Konflikto.“
Ho, la afero pli kaj pli kriziĝas, mi pensis,
unue la Oriento kaj nun Konflikto.

„Estas jam iomete malfrue, mia karuleto, estas
tempo enlitiĝi.“ mi penis deturni la scivolemulon
de la afero, „atendu ĝis morgaŭ, morgaŭ mi de-
tale rakontos al vi pri la konfliktoj kaj ilia lando.“
„Faru tion hodiaŭ, mi petas, mi ankoraŭ ne
estas dormema.“

„Lasu min,“ mi rediris kolere, por kaŝi mian
embarason, „mi estas laca.“
„Jes, enlitiĝu.“ helpis min mia edzino kaj ri-
gardis min iomete kompare. Mi supozas, ke ŝi
komprenis min. La sekvintajn tagojn mi trastu-
adis ĉiujn haveblajn prĝeografajn librojn en ĉiuj
bibliotekoj de Naivurbo. Nenie mi trovis ion pri

Kiamaniere? 1. La cerbo estas esence influata
de la agado de l' mano. La manlerteco ne de-
pendas de la mano, sed de la cerbo; tie ĝi havas
sian sidon. Certaj lingvaj difektoj ekz. povas
esti sanigataj per laŭplanaj ekzercadoj de la dekstra
mano kaj brako. Ĉar de la maldekstra cerbo-
duono, kie la lingva aktiveco havas sian sidon,
ankaŭ la movado de la dekstra mano estas direkt-
ata. El tio rezultas: ekzistas neniu laboro de l'
mano, kiu samtempe ne ankaŭ estas laboro de l'
cerbo. Korpa lerteco dependas de la respondaj
movadĉeloj de la cerbo. Tial la mano estas vojo
kondukanta al la cerbo, kaj la manlabora instru-
ado estas speco de spirita edukado.

2. La manlaboro efikas favore al la disvolv-
iĝo de l' intelekto, volo, karaktero.

a) Intelektio. Laborante oni devas pensi, mediti
ĝenerale; ja, delikata, komplikita laboro postulas
multe da medito, reflektado; ĉar la alcentrigo de l'
pensoj estas necesa por tia laboro. Do ĉiu man-
laboro, kiel skribado, desegnado, formado, fabrik-
ado de objektoj, estas grava por la disvolviĝo
de l' intelekto; ĉiuj postulas pripensadon. Kaj la
edukado je la laboro kaj je la ŝatado de la laboro
estas rimedo por la konservado de la kulturo,
por resti sur la nuna kulturalteco.

Kiam dum la laboro en ĝardeno peza ŝtono
estas levata per stango, la infanoj vidas la efikon
de l' levilo. Farinte provojn ĉe aliaj objektoj,
ili trovas levileĝojn. Do ankaŭ la ĝardeno laboro
devigas mediti, instruas, alportas scion, konojn.

En la laborlernejo la infanoj sin okupas pli multe
pri videblaj, konkretaj aĵoj, malpli pri historioj,
rakontoj, do malpli kun abstraktaj aferoj. Sekve
de tio la perceptoj (germ.: Wahrnehmungen, fr. kaj
angle: perceptions) kaj intuicioj (fr. kaj angle:
intuitions, germ.: Anschauungen) povas sin formi
pli facile, pli precize, kaj ili estas la fundamento
de ĉiu ekkono kaj kono.

Kiel oni scias, la infanoj havas pli da intereso
por la konkreto; tial ili estas ankaŭ pli atentaj
en tiu ĉi instruado, kaj sekve de tio la perceptoj
kaj intuicioj fariĝas pli precizaj.

Pro la multaj kaj precizaj perceptoj kaj intui-
cioj, kiujn la laborlernejo liveras, ankaŭ la fanta-
zio povas disvolviĝi pli bone kaj pli facile; ĉar ĝi
laboras per la estantaj intuicioj kaj imagoj, kiuj
estigas el tiuj. — Precipe klaraj imagoj estas
necesaj, por disvolvi la kapablecon de l' pensado,
kiu do ankaŭ estas akcelata de la laborinstruado.

b) Pli la laboro influas la formiĝon aŭ eduk-
adon de l' volo. En la hodiaŭa lernejo oni precipe
serĉas efiki sur la volon per historioj, rakontoj.
Dum tia instruado la infanoj ofte alprenas decidon
imliti la bonulojn de la historio, eviti la malbonon.
Sed la volo ne povas fariĝi fare tie ĉi. Sed dum
la komuna laboro en la laborlernejo sin povas
efektiviĝi tul.

Laborante ni movas diversajn muskolojn, kiujn
ni ekzercas. Per tio ni edukas ankaŭ la volon.
Malfortaj, neekzercitaj muskoloj kaj malforteco en
la agado interrilatas kaj estas konsekvencoj de
la sama kaŭzo: manko de movaktiveco de l'
cerbo. Tial la sentenco en laborejoj: „Formu la
okulon, ekzercu la manon; fortika fariĝas la volo,
sagaca la intelekto.“

c) Ankaŭ la formiĝo de l' karaktero estas
akcelata en tiu ĉi lernejo. Tie la laborkomuneco
estas efektiva kiel eble plej multe: ĝi estas
principo. Kaj moralaj ecoj estas akirataj nur en
la sociala komuneco. (Do Goethe diras: Karaktero
formiĝas en la toronto de l' mondo, en la vivado
inter la homoj.) En tiu ĉi lernejo la infanoj ne
nur sidas kune, sed ankaŭ laboras kaj vivas
kune kaj ili povas montri ĉiujn ĉi virtutojn, kiujn
oni deziras de ili en la vivo. — Laborante komune,
la lernantoj rimarkas, ke ĉiu devas fari sian parton
konsciencie, se ankaŭ tio estas tre malgrava.
Tiel ankaŭ la morala edukado estas akcelata tie.

Konflikto. Mi ne komprenas tion. Same sen-
utila estis mia serĉado en diversaj muzeoj. Ves-
pere mi aŭskultis prihistoriajn paroladojn, ĉar mi
supozis, ke oni nuntempe eble pritraktos la land-
ojn, morojn, kutimojn kaj ŝancojn de l' militantaj
partioj. Bedaŭrinde mi estis senluziligata. Oni
paroladis pri la „Orienta demando“, ankaŭ la kon-
flikto estis kelkfoje citata, sed la parolado nur
pli konfuzis min. Poste mi skribis al la redaktoro
de nia „Intelektala ĵurnalo“, por ke li sciigu min
en la „Parolejo“, en kiu terparto estas la lando,
sed li nur respondis, ke „mia humorplena demando
tre ĝoigis lin.“ Humorplena demando! Mi dankas
por tia humoro. Se li estus en mia situacio, li
ne parolus pri humoro. Sed mi supozas, ke li
mem ne sciis.

Ĉiuvespere mia filo revenis al sia demando.
Ĉiufoje mi devis prokrasti je iu preteksto mian
respondon.

„Pro kio vi ne diras ĝin,“ li fine riproĉis, „ĉu
vi eble ne scias? Tiuokaze mi demandas mian
kamaradon Karlo; lia patro scias ĉion.“

Sinjoro! Ĉu mi ne estas kompatinda viro? Ĉu
mi ne ĉagreniĝu, ĉar ĉiokaze mi devas ekscii,
ke aliaj edzoj kaj aliaj patroj estas pli saĝaj ol
mi? Ĉar ĉiokaze oni atestas al mi mian stult-
econ? Kaj ĉu mi toleru, ke pro ĉi tiuj malben-
indaj konfliktoj mia eta aŭtoritato, kiun mi ankoraŭ
ĝuas, senreste malestiĝos? Helpu min, sinjoro,
vi estas mia lasta espero. Skribu al mi, skribu
tuj, kie troviĝas la stranga lando Konflikto. Mi
estas certa, ke vi scias tion. Kiel redaktoro de
internacia gazeto vi devas tion scii, kiel sam-
ideano vi havas la devon plenumi mian peton,
kiel amiko vi volonte faros tion. Jam antaŭe vi
havas mian plej koran dankon. Se vi mem ne
scias tion, faru enketon en via gazeto inter la

3. Fine la laborlernejo zorgas preferinde pri
la vivo. La homo evoluas, kiel oni scias, plej
bone, se li enkreŝkas en la kulturon, kaj tiun
disvolvigon la laborlernejo favoras. Ĝi zorgas
pri la kompreno, ŝtofo kaj boneco de l' laboro,
pri formiĝo de l' gusto, konado de l' transportaj
aferoj kaj pri ĉiuj aliaj grandaj organizoj de nia
tempo. Agemajn kaj produktantajn homojn
ĝi liveras al la vivo.

Tezoj.

1. La laborinstruado estas fako por si mem.
2. En la laborlernejo la propra sperto estas
komenca punkto kaj centro de l' infana agado.
3. La lernantoj devas akiri al si mem la
konojn.
4. La laborkomuneco estas principo.
5. La manlaboro influas esence la cerbon; ĉiu
manlaboro ankaŭ estas cerba laboro.
6. La laborinstruado efikas favore por dis-
volvigo de l' intelekto, de la volo, kaj estas grava
por la formiĝo de l' karaktero.
7. Ĝi ankaŭ zorgas plej bone pri la vivo.

XV-a Universala Kongreso de Esperanto en Nürnberg.

Dua Cirkulero.

1. **Dato.** La XV-a okazos, laŭ interkonsento
kun K. K. K., de la 2-a ĝis la 8-a de aŭgusto 1923.

2. **Kotizo.** La fiksado de la Kongresa Kotizo
estis tre malfacila en la nunaj cirkonstancoj. Ni
konsideris, ke la sumo pagota de altvalutaj landoj
povas esti pli alta ol tiu pagota de malbonvalutaj,
tamen ne tiel ke la lastenomitaj kaŭzu efektivan
malprofiton al la kongresa kazo. Serĉante kon-
venan bazon, ni starigis, interkonsente kun K. K. K.,
jenan tabelon:

Belgio	30	frankoj
Britoj	20	ŝilingoj
Danoj	20	kronoj
Ĉekoslavoj	50	kronoj
Finnlandanoj	75	markoj
Francoj	30	frankoj
Germanoj	200	markoj
Hispanoj	25	pesetoj
Italaj	50	litroj
Nederlandanoj	10	guldenoj
Norveĝanoj	20	kronoj
Svedoj	15	kronoj
Svisoj	20	frankoj
Usonanoj	4	dolaroj
Aŭstroj	} 200	germanaj markoj
Hungaroj		
Poloj		
Rusoj		

Ĉiu pagu en la mono de sia lando per mon-
biletoj aŭ bankĉekoj. Samideanoj el landoj kun
aliaj monunuoj ol la suprenomitaĵa pagu aŭ
dolarojn aŭ ŝilingojn aŭ guldenojn aŭ svisaĵn
francojn aŭ petojn pri speciala arango.

Favorotizoj por familianoj ne ekzistas. Kiu
aligos post la 1. de junio, pagos plialtigon de
50%. Repago de kotizo ne okazos. La unuaj
mil aliĝintoj ricevas priurban donacon.

3. **Garantia Kapitalo.** Por certigi la financojn,
estas fondita speciala „Garantia Kapitalo“, al kiu
la samideanoj bonvolu noti garantiojn po almenaŭ
gmk. 5000.— La garantiitaj sumoj estas enkasig-
ataj nur, se la kongresaj elspezoj superos la
enspezojn, kaj proporcie al eventuala malprofito.

4. **Donacoj.** Sub ĉi tiu rubriko ni notas
mondonacojn, faritajn al la Kongresa Kazo. Ĉar
la organizaj elspezoj estas tre grandaj, kaj nur
parte povos esti repagataj per la kongresa kotizo,
la L. K. K. sin turnas al ĉiuj samideanoj, petante
monsubtenojn.

Esperantisto; certe per tio ni havos sukceson.
Sed ne prokrastu, ĉar senpacience atendas vian
respondon

via amiko

Kristiano Mallera.

La arbo de l' paco.

Verkis: Kain Abel.

La grandurbo festis. Apenaŭ bruiĝis ĝian
komfortan silentadon hazarde cirkulanta ĉaro, la
fajra sunbrilo fandis nur la mason de la pavimo,
eĉ ne unu persono estis videbla, ĉiu ripozis, oni
serĉis la malvarmetan ombreon de la arboj, por
trankviligi la animojn trolaciĝintajn...

Ŝi trovis ĉion fremda, kvankam ŝiaj songaj
celoj kunportis ŝin ĉi tien, nun malvasta estis la
knabincambreto, la ĝardeno plena de ruĝigantaj
fruktoj perdis por ŝi ĉiun ĉarmon, ĉar pensoj
bataladis en la animo, kiuj instigis ŝin foriri de
la hejmo, for de ĉi tie, kie ŝi scias pri ŝiaj doloroj,
kie oni esploras sekretajn pensojn, sed alie ne
atenias pri ŝi. Kial restadi, ĉar ŝin jam ne vizitos
tiu, kiun ŝi ĝis nun ĉiam atendis. La romanon
naivan finis la malkompreno...

Iri, iri de
tie ĉi, ien ajn, kie homoj ne troviĝas, kie nur la
somero pompas, birdetoj pepadas, florplene kliniĝ-
adas diversaj kreskaĵoj, venteto diskrete ludas sian
melodion sur foliaroj. Ho! Kiel malproksime
estas la arbaro, kiel neatingebla ŝajnas la limo-
monteto, kaj la suno brilas je ŝi kvazaŭ trabor-
ante la animon. Se ŝi nun irus kun li, se li ŝin
ĉirkaŭprenus, kiel ŝi ĝojus pri la varmeco de l' suno,
kaj ĉagreniĝus pro la mallongeco de la montoj...

Dum la knabino piedradis, kaj ŝian veston
grizigis la polvo de la landvojo, en la kontraŭa
kvartalo de la urbeĝo estis ankaŭ iu, kiu trovis
orfa la vivon...

5. **Blindula Kaso.** Plenumante deziresprimojn de la XIII-a kaj XIV-a Kongreso en Praha kaj Helsinki, la L. K. akceptas pere de la aliĝiloj mondonacojn por la kaso de blindaj Esperantistoj.

6. **Envojaĝa permeso.** — Por envojaĝa permeso, laŭ bavara leĝo, ne la registaro, sed la distrikta polico estas kompetenta. La Esperanto-ema Nürnberga konsilantaro kiel invitinto de la kongreso promesis ĉian apogon kaj forigon de ĉiuj rilataj malfacilaĵoj.

7. **Fakaj kunsidoj.** — Ĉar estonte la kongresaj fakkunsidoj certe havos pli grandan gravon, ni speciale prientos ilin. Elektinte jam lokajn organizantojn, ni publikigas jam nun la adresojn por kelkaj fakoj:

por blinduloj: Wilhelm Reiner, direktoro de la blindula instituto, Kobergerstrasse 147.
por filatelistoj: Max Hönigsberger, Albrecht Dürer-Platz 6.
por juristoj: D-ro Heinrich Orthal, Fürtherstr. 2.
por komercistoj: Emil Muscat, Tucherstr. 21.
por kuracistoj: D-rino Eugenie Steckelmacher Spittlertorgraben.
por laboristoj: Georg Gerber, Allersbergerstr. 57/III.

por scienculoj: D-ro Otto Kleider, Kaiserstr. 7.
Ni arangos ankaŭ aliajn fakkunsidojn, pri kiuj ni raportos pli poste.

8. **Plezuroj.** Dum la kongreso ni arangos, laŭ tradicio, diversajn festojn kaj plezurajn teatrajn reprezentadojn, internacian balon, ekskursojn, koncertojn ktp.

9. **Komitato.** D-ro Richard Ledermann, prezidanto de L. K. K., kaj Otto Pilhofer, 1. vicprezidanto de L. K. K., estis elektitaj anoj de K. K. K.

10. **Korespondado.** Ni petas, ke oni aldonu por kongresaj respondoj la afrankon per laŭlanda poŝtmarkoj aŭ respondkuponoj.

Loka Kongresa Komitato.
D-ro Ledermann.

Alvoko al la IX-aj Internaciaj Floraj Ludoj.

Al la Esperantistaj verkistoj:
La Komitato de la IX-aj Internaciaj Floraj Ludoj vin salutas kaj invitas partopreni en la jenaj konkursoj.

Ordinaraĵoj Temoj.

Originalaj Tekstoj:

- I. Originala versaĵo kantanta *Amon*.
- II. Originala *Ama* verko en prozo.

Tradukitaj Tekstoj:

- I. Traduko de versaĵo el hispana lingvo.
- II. Traduko de prozaĵo el hispana lingvo. (La tekstoj estas publikigitaj en la n-oj 8—9 de „Kataluna Esperantisto“, Carme 30, Barcelona.)

Eksterordinaraj Temoj.

- I. — Premio de la Ekscelenta Urbestro de Manresa: 100 pesetoj. Temo: Laŭvola.
- II. — Premio de la „Mankomuneco de Katalunujo“: Kolekto de la verkoj de la mezepoka kataluna filozofa Ramón Lull. Temo: Laŭvola.
- III. — Premio de la Parlamento Deputito s-o Josep Creixell: 100 pesetoj. Temo: Laŭvola.
- IV. — Premio de la Deputitoj de la kataluna Mankomuneco s-oj Valls, Borràs, kaj Minoves: 50 pesetoj. Temo: Laŭvola.
- V. — Premio de la Manresa grupo „Bela Espero“: 50 pesetoj. Temo: Laŭvola.
- VI. — Premio de „Amikoj de la Popola Kulturo“ de Manresa: 50 pesetoj. Temo: Laŭvola.
- VII. — Premio de la Gazetara Asocio de Manresa kaj regiono: 50 pesetoj. Temo: Laŭvola.
- VIII. — Premio de „Centre de Dependents de el Comerç i de l'Indústria“ de Manresa: 25 pesetoj. Temo: Esperanto ĉe la asocioj de komercaj komizoj.

Li ankaŭ ekiris... La distanco ĝis la arbaro estis nur kelkcentpaŝoj, ĉe la stralkurbigo jam estas videbla la monto, kie resiliĝas la interno ribelema, la konscienco kulpa...

Ambaŭ serĉas la grandan kverkon, sub kies foliaro ili mulfoje pasigadis bablante la tempon. Al la pasinteco de la kverkego ligiĝas fabeloj kaj legendoj, apud la potenco trunko renkontiĝis geamantoj, kaj trovis azilon de jarcentoj multe da migrantoj. Oni nomis ĝin la arbo de paco... Kial ne povu vagadi ĝuste ĉi tien ĝeturmentatoj?

Cedeme ekklinitas la folietaro ambaŭflanke, subite renkontiĝas du rigardoj. Silento regas, mufiĝas ĉio, eĉ eta bruto ne intermiksiĝas, nur la okuloj parolas, la diversaj vizaĝaspektoj esprimas, ke estas grandaj bataloj ĉi tie, la petola-ema venĝo atakas ribelemajn junanimojn. Ili volas samtempe ekiri, poste unue ekmoviĝas... La malluna kverko mole sufforetas, ĝial folioj ekkliniĝadas fidge, urĝige... Finfine ili alproksimiĝas. ekprenante neĝblankan maneton, montrante al la arbo:

... Jen la pacarbo... Ĉi tie ne ekzistas kolero... nur amo devas regi.

La Maro.

Mirinda estas nia maro —
Sinfina blua salakvaro.
Jen maro dormas tute paca:
Spegule brilas la surfaca
Kvieto akvo, kaj silento
Mistere regas, foras vento...
Tra vitroŝajna akvo pura
Vidiĝas fundo: alg' purpura,
Koraloj, konkoj, anemonoj,
Marenacoj, venusonoj,
Flietoj junaj dense aras,
Sub akvo mararbaro staras
El akvoherboj ĉiuspecaj
Kaj spongoj vivaj mirindecaj.

IX. — Premio de la Manresa „Pomells de Joventut“: 25 pesetoj. Temo: Laŭvola.

X. — Premio de la „Manresa Orfeono“: Artobjekto. Temo: Carmo de la muziko.

XI. — Premio de la fama „Bizarro Jorba“ de Manresa: 100 pesetoj. Temo: Laŭvola.

XII. — Premio de la „Eskursa Societo“ de la Bages'a regiono: Artobjekto. Temo: Laŭvola.

XIII. — Premio de la Manresa „Laborista Ateneo“: 50 pesetoj. Temo: Laŭvola.

XIV. — Premio de „Montepio Artesà“ de Manresa: 50 pesetoj kaj honora diploma. Temo: Mutualismo.

XV. — Premio de la „Terkulturista Cambró de l' Bages“: 25 pesetoj. Temo: Laŭvola.

XVI. — Premio de „Enciklopedia Popola Ateneo“ de Barcelona: 25 pesetoj. Temo: Traduko de la popola kataluna kanto „La presó de Lleida“ (Havigo la plenan tekston la Sekretario de la Floraj Ludoj).

XVII. — Premio de la Esperanta societo „Nova Sento“ de Barcelona: 75 pesetoj. Temo: Versaĵo el du strofoj enhavantaj ĉiu 12 liniojn, adaptebla je muziko kaj taŭga kiel himno de la societo „Nova Sento“.

XVIII. — Premio de la „Barcelona Stelo“: 50 pesetoj. Temo: Laŭvola.

XIX. — Premio de „Kataluna Esperantisto“: Dumviva abono al la gazeto. Temo: Severa unueco, nepra kondiĉo de internacia lingvo.

Inspiron al ĉiuj por la gloro de nia Literaturo!

E. Grosjean-Maupin, prezidanto — Josep Albagés, — Louise Briggs, — Delf Dalmau. — Artur Doménech. — Marian Sold, sekretario.

Barcelona, sept. 1922.

Notoj.

I. — La aŭtoroj de la kvar premilitaj Ordinaraĵoj Temoj (Originalaj Tekstoj I, II; Tradukitaj Tekstoj I, II) ricevos lukse blinditan ekzempleron de la verko „Vivo de Zamenhof“ de nia eminenta pioniro Edmond Privat.

Krome estos donata al ĉiu laŭreato bela stesta diploma.

II. — Al la aŭtoro de la plej bona teksto (versaĵo aŭ prozaĵo) el la kvar ordinaraĵoj premilitaj verkoj, la Komitato aljuĝos la *Naturan Floron* kaj la rajton elektit Reginon de la Festo.

III. — La verkoj prezentotaj devas esti verkitaj en Esperanto kaj ne ankoraŭ eldonitaj.

IV. — La Festo de la IX-aj Floraj Ludoj okazos en Manresa dum la X-a Kongreso de la Kataluna Esperantista Federacio la proksiman aprilon.

Sed preskaŭ ĉiam ondas maro
Kaj sendas ondojn al bordaro:
Post ĉiu onda akvoĵeto
La sablon lekas punta reto,
Kaj siblas, sur la sablo ŝova,
Glitante mola kaj senpova.
Dum belvetero la delfinoj
Elmontras vostojn post la spinoj
Saltantaj el la verda ondo
Rapide, en la luda rondo,
Kaj la atako al falezo
De l' ondoj ŝajmaj en frenezo
Timigas per la paŝaj bruoj,
Tondradoj kaj gigantaj skuoj.
Altiĝas montoj, marhinduroj
Subflugas ĝis la ondprofundoj,
Kaj la senbrida ondorulo
Furie dancas en nebulo
Krelita de la akva polvo
Levita de ventega volvo.
Ondegoj, kvazaŭ la mustangoj,
Galopas en la densfalangoj,
Mil hufoj egaj frapas, baŭmas,
Kolharoj krispaj blankaj ŝaŭmas...
Laciĝas veni, paciĝas blavo —
Foriris uragana povo.
Nur restas nun majesta hulo,
Ondegoj larĝaj kaj la lulo.
Aperis suno, ĉesis fluo,
Kaj super maro brilas bluo.
Karesa varmas la radio
Kaj ree gajas amfibio.

Originale verkis Petro Stojan, L. K. (Jugoslavio).

algo marherbo, falezo izola ŝtonego sur bordo, mustango duonsovaĝa ĉevalo amerika, baŭmi starigi sur postaj kruroj, hulo senventa ondumovo mara, stormo ventego.

La sovaĝa grafo.

De D-ro Joh. Ev. Schweiker.

Vivis iam grafo en sia kastelo „Brilstonego“. Li estis fortega kaj kruela kaj ŝatis nur sian glavon kaj vinon.

V. — Al la manuskriptoj — kiu devas esti ricevitaj antaŭ la 31. januaro 1923 de la sekretario s-o Marian Sold en la sidejo de la Kataluna Esperantista Federacio (str. Carme, 30 Barcelona) — oni devas aldoni devizon, kaj sendi en koverto fermita, kiu portos la saman devizon, la nomon kaj adreson de la verkinto.

VI. — Manuskriptoj ne estos resendataj, eĉ se ili alvenis post la datolimo por akcepto de verkoj.

VII. — La membroj de la Jugontaro partoprenos en neniu konkurso.

VIII. — La Komitato publikigos la verdikton per „Kataluna Esperantisto“ kaj per la Esperantaj katalundaj gazetoj, kiuj bonvolos ĝin represi.

Dankletero

de la II-a Blindul-kongreso en Helsinki.

Je la nomo ne nur de la Blindulkongresanoj, sed ankaŭ de la tutmonda Esperantista blindularo, ni esprimas per ĉi tiu la plej varman kaj koran dankon al ĉiuj malavaraĵoj ĉefkongresanoj, pro la sincera simpatio kaj grava pruvo de oferemo, kiujn diversokaze ili montris al la blindaj gefratoj.

La rezultato de monkkolekto dum la unua laborakunsido kaj de la vendado dum la kostumbalo montras profiton de 89,24 sv. kr., aŭ 1110 fmk., laŭ tiutaga kurzo.

Specialan dankon meritas ne nur la ĉefkongresna komitato pro la afabla permeso, sed ankaŭ s-o Enrique Legrand (Montevideo, Urugvajo), kiu instigis je la monkkolekto, kaj f-ino Božena Vičková (Praha, Ĉeĥoslovakujo), kiu sukcese kunhelpis la vendadon. Ni ankaŭ citu s-on Blicher (Kopenhavn, Danujo), kiu per malavara donaco malfermis la kongresvojaĝan fondon de la Finnlanda Blindularo, kaj s-on Tell (Stockholm, Svedujo), kiu sur ŝipo „Birger Jarl“ post aranĝo de okaza teatraĵo, organizis ankaŭ sukcesan monkkolekton por „Esperanta Ligilo“.

„Esperanta Ligilo“, nepre necesa gazeto de nia sendida samideanaro, plene meritas la subtenon de ni ĉiuj, kaj pro tio, laŭ decido de la XIII-a en Praha, diversaj ĵurnaloj, malfermis monkkolektojn, per kiuj ĉiuj oferemuloj povas ĉiam fakte, materie memori pri la blindularo.

Ankaŭ al tiuj helpemaj redakcioj nian elkoran dankon.

Sed iun tagon okazis, ke li malsaniĝis. Ses belaj knaboj devus flegi lin, ĉar al neniu virino estis permesite eniri lian ĉambron. Li malmamis la virinojn!

La grafo estis treege malpacienca dum sia malsano kaj insultis la knabojn nomante ilin „mallaboremuloj“.

Tio malplaĉis al la knaboj kaj ili fariĝis malvigilaj en la servado.

Nur unu knabo flegadis la grafon ĉiam kun granda fervoro kaj kvieta animo, eĉ se la malsanulo maldelicate alparolis aŭ batis lin, kaj ĉiam la okuloj de tiu ĉi flegisto estis kunsentemaj kaj liaj vortoj konsolplenaĵoj por la suferanta estro.

Kiam poste la grafo estis resaniĝinta, li kunvokis la ses knabojn.

„Mi volas“, li diris per solena voĉo, „distingi tiun el vi, kiu flegis min plej zorgeme; li estu mia amiko kaj kunmanganto!“

Dirinte tion, li paŝis al la fidela knabo, kisis lin kaj ordonis, ke la knabo ankaŭ kisu lin. La knabo obelis. Sed fulmo! Nun la grafo eksentis laŭ la kiso kaj ĉirkaŭpreno de la knabo, ke tiu ĉi ne estas knabo, sed kiel knabo vestita — ĉarmega knabino!

Kaj la grafo fariĝis poste ŝia edzo kaj lia animo moligis kaj boniĝis deponi tiu horo.

Humoro.

Artefarita!

Antaŭ nelonge mi faris propagandan paroladon por Esperanto. Inter la ĉeestantoj iu sinjoro vidigis fortan malpaciencon. Fine li in'errompis min dirante: „Viaj lingvaj klarigoj tute ne interesas min! Mi venis, por aŭdi ion pri la nova, artefarita butero „Esperanto“. Diru la prezon, alie miiros al la konkurantoj!“
Kiuza.

Kun sinceraĵ, respektplenaĵo saluto al ĉiuj je la nomo de la Blindulkongreso estraro

Hendricx Victor, sekretario.

Zalmstraat 43, Gent, Belgujo.

La sekretario volonte donos informojn pri blindulmovado.

La XII-a Germana Esp. Kongreso en Plauen prokrastita ĝis 1924!

Sekve de la elekto de Nürnberg kiel mondkongresa urbo 1923 la cirkonstancoj por la Germana Esperanto-Kongreso en Plauen tute ŝanĝiĝis deponi nia unua komuniko. Estas fakto, ke nur malnultaj germanaj samideanoj povos veturi dum unu jaro al du kongresoj. Elektante unu el la vojaĝoj al Nürnberg aŭ Plauen, oni certe preferos la urbon de la mondkongreso, kaj la germana kongreso estus vizitata nur de malmultaj Esperantistoj. Sed por ke la kongreso estu sukcesplena, estas necese, ke aliĝu kaj partoprenu kiel eble plej multe da samideanoj. Tio do ne estas ebla en la venonta jaro pro la proksimeco de la mondkongresa urbo.

La estraro de la Germana Esperanto-Asocio opinias kiel ni kaj proponis la prokraston de Plauen'a kongreso je unu jaro.

La XII-a Germana Esperanto-Kongreso en Plauen do okazos je Pentekosto 1924.

Ĉar ni pro la ĝisnunaj kongresaj preparoj jam havis multe da elspezoj, ni petas la samideanojn, kiuj jam aliĝis al nia kongreso, ke ili bonvolu valorigi siajn aliĝojn ĝis 1924!

Willy Rödel,
Hermann Scheider.

Leterkesto de ET.

Al multaj anoncantoj ni denove sciligas, ke pro teknikaj kaŭzoj tekstoj de anoncoj devas alveni ĉe ni minimume 10 tagojn antaŭ la apero de ET.

G.v.d. en Wormerveer. — Ĉu vi nun regule ricevas ET? P. l. en Budafok. — Dankon por foto. Unu estos resp. alia ne sufiĉe aktuala. Unuan fojon ne ricevis.

W. Pf. en Łódź. — Ĉu via amiko Braun konsentis pri la eventuala publikigo de siaj poemoj, kiujn vi sendis al ni?

K. S. en Crimm. — Dankon pro via foto, kiun ni metas en nian albumon!

R. L. en P. — Koran dankon por foto de via grupo. Represo bedaŭrinde ne ebla, ĉar foto ne sufiĉe bona kaj kilaĵoj nun tro kostaj.

J. R. S. en K. — Vi skribas: „En pli frua numero de ET mi legis vian scigon, ke — se ĉiu abonanto varbus nur unu novan abonanton — la gazeto ET povus aperi 8-paga. Vi povas treege facile skribi tion ĉi, sed ne estas same facile fari ĝin... Se oni deziras varbi abonanton, estas necese fari novajn Esperantistojn...“ Jes, vi estas tute prava: estas necese fari novajn Esperantistojn. Tamen, ekzistas ankaŭ jam multoj da Esperantistoj, kiuj ankoraŭ ne estas abonantoj de ET. Do ni petas niajn abonantojn varbi novajn abonantojn inter la jamaj Esperantistoj, kaj fari novajn Esperantistojn-abonantojn. Tiamaniere ET baldaŭ atingos la deziratan eldonombrojn.

S-o Bormanis en D. — Koran dankon pro viaj parte tre pravaj rimarkigoj kaj korektoj. Gratulon pro via „jubileo“!

A. V. en Wien. — 105 ni tuj sendis al vi. Ni regule ekapedia deponi 91. Kiu numeroj mankas ankoraŭ?

Fr. Qu. en Nordingr. — Teksto kaj nomoj de via anonco ne legeblas. Senditan sumon ni tial uzas por daŭrigo de via abono.

Diversaĵoj.

La libroproduktado deponi Gutenberg.

La nombron de la libroj, kiuj aperis deponi la 15. jarcento, oni taksas jam ofte kaj diverse. Anglia bibliotekisto opinias, ke la nombro de la ĝis nun presitaj libroj estas 10—20 milionoj. La nombron de la plej fruaj presaĵoj oni taksas je 40000. La novaperaĵoj de la 16. jarcento taksigas je 570000 volumoj, en la 17. jarcento jam je 1250000, en la 18. jarcento je 2 milionoj kaj en la 19. jarcento je 8250000. Do la tuta sumo de presitaj libroj ĝis la komenco de nia jarcento nombrigas je 12110000 diversaj libroj. Ne enkalkulitaj estas la periodaj eldonaĵoj, kiujn oni ne povas nomi libroj kaj kies nombron oni taksas je ĉirkaŭ 15 milionoj. La amaso de noveldonajoj, kiuj ĉiulare estas eldonitaj en nia jarcento, ankaŭ ne estas certe konstatebla. Sed oni taksas la librorikolton de unu jaro je minimume 285000 volumoj. Se oni kalkulas la meznombro de la novaperaĵoj en la lastaj 22 jaroj nur je 200000 volumoj poŝtare, rezultas sumo de 4400000 volumoj deponi 1900. Laŭ tiuj kalkuloj do la tuta nombro de la presitaj libroj en la mondo superas 16^{1/2} milionojn. Se oni nun plu demandas pri la kvalito kaj valoro de ĉi tiu grandega nombro, oni venas kun la bibliotekisto al tre pesimistaj konkludoj. La librokonanto asertas, ke el ĉi tiuj 16^{1/2} milionoj de novaperaĵoj libroj maksimume 50000 indas daŭran konservadon; eble estas eĉ nur 20000 libroj, kiuj ankoraŭ restis vivaj, kaj ĉiokaze estus tre malfacile, nomi eĉ nur 5000 titolojn de libroj verkoj, kies perdo malriĉigus la homaron.

Ruslandaj Samideanoj!

Tre ofte ni ricevas petojn pri senpaga sendado de ET, ĉar pago al Germanlando estas ne ebla aŭ malfacila. Ni ja volonte liveras specimenojn aŭ propagandajn numerojn; sed daŭre liveri ET sen pago, hodiaŭ ne plu estas ebla al ni. Ni havas nun en via lando bone funkciantan abonejon ĉe samideano M. Valentinov, Moskvo, poŝtekesto n-o 630. Al li vi bonvolu turni vin, ĉar li akceptas vian monon.

Germanaj poŝtabonantoj

Kiu ne jam sendis la plupagon por la kuranta kvaronjaro, foru tion tuj; alikaze ni ĉesigus la liveradon.
Adm. de ET.

Alvoko

al la Esperantistaj scienculoj, literaturistoj, artistoj, kaj ĉiuspecaj fakuloj!

Je la tria fojo okazis dum la monato aŭgusto 1922 en la Monda Palaco en Bruselo Internacia Semajnoduo, dum kiu diverslandaj scienculoj, literaturistoj, artistoj, venis paroladi pri temoj koncerne sian profesion. Ĉiuj ĉefaj lingvoj de la civilizita mondo estis uzataj por tiuj paroladoj. Dank'al la sindonemo de s-oj Paul Oilet kaj Henri Lafontaine, la kreintoj kaj organizantoj de la Semajnoduo, Esperanto estis ankaŭ akceptita de la unua fojo (1920) inter tiuj lingvoj.

En 1920 s-ino Cense, D-ro P. Corret kaj D-ro Vanverts; en 1921 s-oj Gabriel Chavel, L. Demarcy kaj Muffang venis trakti temojn diverssciencajn por pravi tiamaniere la praktikan uzablecon de nia lingvo. Nunjare kvin paroladoj plej diversaj temas estis donitaj de f-ino Jennen kaj de s-oj L. Demarcy, M. Somerling kaj L. Cogen.

Ĉiuj antaŭnomitaj gesamideanoj estas ĉu francoj, ĉu belgoj. Estus tamen necese, ke estonte ankaŭ alinacianoj partoprenu la semajnoduon, por ne nur montri per la traktitoj temoj la taŭgecon de nia lingvo en ĉiuj kampoj de la homa agado, sed ankaŭ, por pravi la similecon, la unuecon internacian de Esperanto je la vidpunkto de elparolado kaj de uzado.

Tial la subskribintoj kunvenintaj la 29. aŭgusto 1922, en la Monda Palaco, ekstarigis Komitaton kun la celo varbi por la estontaj Internaciaj Semajnoduoj diversnaciajn amiklandajn paroladontojn Esperantistajn kaj esperas, ke la gesamideanoj komprenos la grandan gravecon de la akcepto kaj de la restado de nia lingvo en tiuj ĉiuj internaciaj manifestacioj de la spirita kaj arta vivo. Kaj kia nekomparebla tempo por la propagando inter la internacia intelektularo estas la Semajnoduo! Ili do faras varman avokon al la amikaj gesamideanoj, kiuj intencas vojaĝi dum aŭgusto 1923 al Bruselo, por fari ian paroladon dum la venonta Semajnoduo (ekzemple antaŭ aŭ post la tiumonda kongreso de Esperanto).

Ili invitas la fremdlandajn gesamideanojn por pleniĝi la Komitaton, reprezentante ĝin en siaj reciprokaj amikaj landoj kaj helpi al la varbado de paroladantoj.

Ĉiuj gebonvoluloj sin turnu al s-o L. Cogen, 52 Dreef, Ninovo (Belgujo).

La starigintoj de la Komitato por la varbado de Esperantistaj paroladantoj por la Internaciaj Semajnoduoj:

F-ino M. Jennen, s-oj L. Demarcy, Peitau, F. Mathieu, V. Hendrix, Fr. Schoofs, Groverman, M. Somerling, J. Pirnay, L. Cogen.

Bruselo, la 29. aŭg. 1922.

P.S. — La Semajnoduoj komencas ĉiulare la antaŭlastan dimanĉon de aŭgusto.

50 ekzempleroj de

LA SENLINGVULO

estas ankoraŭ riceveblaj!

295-paĝa romano, plena de interesaj okazintaĵoj.

Prezo (inkluzive sendkostoj)
por bonvalutuloj 320.— gmk.
por mezbonvalutuloj 200.— gmk.
por malbonvalutuloj 160.— gmk.

Butin & Jung, Godesberg, Germanlando
Poŝtĉeka konto Köln 92056.

Eldonejo „Esperantista Voĉo“, Jaslo, Pol.

(Posedanto: Salo Grenkamp-Kornfeld.)

Bankkontoj: Poŝtĉekaj kontoj:
Wiener Bank Verein, Wien I Leipzig n-o 89775
Wohl & Cie, Danzig Praha n-o 59354
Bank Matopolski Varsovio n-o 140 685
Bankdomo Kornfeld Jaslo Zŭrich n-o 7 263

Ni liveras ĉiujn Esperantajn librojn. Al konstantaj mendantoj ni konsilas malfermon de konto ĉe ni.

Inter aliaj ni rekomendas

el originaloj:

Belmont, Leo: Sonoj Esperantaj, bind.
Boucon, H.: Humoroj
Elski kaj Eska: Unuaj agordoj
Grabowski, Antoni: Nova Antologio
Grenkamp, Salo: Krijoj de l' koro
Šapiro, J.: Babiladoj de bonhumora Zamenhofano.

el tradukoj:

Balucki: Ama bileto, trad. Ender
Grabowski, A.: El parnaso de popoloj
Grenkamp, Salo: Penseroj
Kabe: Internacia Krestomatia
Mickiewicz, A.: Sinjoro Tadeo, trad. Grabowski
Orzesko, E. A.: A. B. C., trad. Ender
Prus, Bolesław: Pekoj de l' infaneco, tr. Grabowski
Przybyszewski, St.: La neĝo, trad. Ficovski

Por la ajn demando aldonu por respondo. Kontraŭ respondokuponon ni forsendas nian prezaron. Pro rapidega sendalorigo de nia monvaloro — sekve plialtiĝo de prezoj — ni ne povas citi la prezojn.



Oni postulu la „Victoria“-Ekspostprezilon

on germana-hispana au germana-angla lingvoj.

Nederlanda Anonima Societo Luksa-pano Fabrikoj

antaŭe Henri J. Carels.

50 Butikoj:
Den Haag, Haarlem, Amsterdam.

Luntejo Carels

(ĉefo: H.A. Scharwächter)
63 Welmarstraat, Den Haag.
Oni parolas Esperanton.

Jus aperis
necesa por propagando kaj kursoj,
Kompletny Podręcznik
języka międzynarodowego
Esperanto
Verkita de Leo Turno
72-paĝa kun antaŭparolo de Bronisław Kuhl
La prezo 250 pol. mk.
Al mendantoj de alm. 25 ekz. konvena rabato.
Ricevebla nur post antaŭa pago.
La adreso:
Leon Schleichkorn, Kraków, Pol., Długa 15.
Postulu paskasan transpagilon.

Hebreaj Esperantistoj kaj Esperantaj Eldonistoj

La propagando de Esperanto inter hebreoj iras malrapide pro manko de lernolibroj en ĵargono kaj hebrea lingvo. Ni havas nun okazon liveri mal-kare kelkilojn da lernolibroj en ĵargono kaj antikva lingvo hebrea, de konata aŭtoro Hanec Nejmánovíc.

Mendojn akceptas la Esperanto-Oficejo „Renoma“, Warszawa, Marszałkowska 91.

Holandanoj!

La plej bona donaco, kiun vi povas doni al via konatulo, okaze de Naskiĝtago, Sankta Nikolao, Kristnasko estas

Bona Esperanta libro

el la

Centra Esperanto Librejo
Bankastraat 2a
Hago, Telefono
H. 6703. Poŝtkonto H. 19450.

Abonejoj de ET en la landoj

Aŭstria: Ferd. P. Huber, Münchberg 5, Salzburg; por Wien: „La Esperantisto“ (d-ro E. Pfeffer), Wien II/1, Postamt 34.
Belga: Frans Schoofs, 46, Kl. Beerstraat, Antwerpen. Poŝtĉeka n-o 28420.
Brazilo: Brazila Ligo Esperantista, Praça 15 de novembro, Rio de Janeiro.
Bulgara: Georgi Hr. Gaŝevski, Bul. Marie Luiza 46, Sofio.
Ĉeĥoslovaka: Otto Sklenčka, Hradec Králové. Otto Lumpe, Trautenau.
Estonia: Est. Esp. Unuiĝo, postkasto 6, Tallin.
Finna: O.Y. Movado A.B., Kasarminkatu 20, Helsinko.
Franca: Esp. Centra Librejo, 51 rue de Clugny, Paris 9.
Hispana: Konrado Doménech, Caldes de Malavella, prov. Girona, Vichy Catalan.
Hungara: Paulo Balkányi, Hajos-utca 15-II-2, Budapest VI.
Japana: Morizo Ga, 16-V, Kitamači, Aojama, Tokio.
Jugoslava: D-ro Dušan Maruzzi, Zagreb, Jezuitska ul., br. 1.
Lava: Taitvaldo Indra, Bija, Pasaia kaste 478.
Litova: Paŭlo v. Medem, Smeltu g-vė 12, Kaŭnas (Kovno).
Nederlanda: J. Ravensijn jr., v. Aersenastraat 200, 'a-Gravenhage. (Poŝtĉeka konto Haag n-o 2875.)
Pola: Adolfo Oberrotman, Krak.-Przedm. 10, Warszawa. (P.K.O. n-o 8196).
— Pola Esp. Servo (Fr. Prengel), Kordeckiego 1a, Bydgoszcz-Bromberg.
Rumana: Esperanto-Oficejo Ĉiuj.
Rusa: Mikaelo Valentinov, sekretario de Centra Komitato de S. E. U., Moskvo, poŝtkasto n-o 620.
Sveda: Förlagsföreningen Esperanto, u. p. a., Stockholm 1.
U. S. A.: The Esperanto Service Corporation, 800 Fifth Avenue, New York City.

Lustroj el Kristalvitro

en ĉiuj stiloj kaj grandoj p.elektra aŭ gasa lumigado, fabrikitaj laŭ propraj kaj indikataj skizoj.

Ernst L. Hettichnach. Freiburg i. Br. Germ., Rheinstr. 60.
Eksporto al ĉiuj landoj.
Kapablaj reprezentantoj serĉataj.

Malmultekostaj donacoj delikataj!

La hungaraj artaj manbrodaĵoj, puntaĵ tuketoj, broditaj koloraj tukoj, kusentukoj, virinaj mansaketoj, ledaj mansaketoj kaj viraj monujoj kun baŭk-koloro, pupoj nacivesitaj manfaritaj, kaj koloraj skatoletoj tre plaĉis dum la kongreso en Helsinko!

Por bonvalutaj landoj malmultekostaj kaj belaj donacobjektaj! Specimenkolekto por 20 sv. fk aŭ egalvaloro. Ekzempleroj haveblaj de 3 sv. fk. Taŭĝaj por revendado. — Mono sendota antaŭe! — (Per tiu manlaboro subtenas sian vivon nun multaj hungaraj sinjorinoj kaj fraŭlinoj! Per mendo Vi do helpas ankaŭ ilin). Mendojn adresu al la delegito de Budapest Paŭlo Balkányi, VI, Hajos u. 15., Hungarlando. La fremduloj vizitante Hungarlandon ĉiam aĉetas multajn tiaspecajn objektojn!

Kapablaj reprezentantoj serĉataj por ĉiuj landoj.

Unuakvalitaj

Ŝtalaĵoj de Solingen:

Raziloj, Razaparatoj, Razilklingoj, Poŝtranĉiloj, Tondiloj, Hartondiloj, je fabrikk-prezo.

Bildoj kaj originalaj specimenoj haveblaj.

Perado per
Komercesta Esperanto Grupo
Freiburg i. Br., Germ., Katharinenstr. 14.
Aldonu al demando respondokuponon.

LA PLEJ LASTA ELTROVAĴO!!!

LA FORNO „MOUSSON“

superas ĉiujn ĝisnunajn fornojn! Por domoj, kambr-oj, oficejoj, fabrikoj ktp. La varmeco iras al malsupre. Ĉio forbrulas. Ne restas videbla fumo! Plej granda eluzo de ĉiuj brulaj aĵoj! Uzbla por ĉiuj hejtmaterioj! — Patentoj anonciataj en ĉiuj landoj!

Licenco doneblaj al multaj landoj por fabrikado!

Informojn peras la del. de UEA por Budapest: Paulo Balkányi, Budapest VI, Hajos u. 15.

Importo. Eksporto.

Pollanda Komerca Agentejo

Adolfo Oberrotman, Varsovio, Krak.-Przedm. 10

deziras ligi komercajn rilatojn kun gravaj eksterlandaj firmoj, speciale en teknikaj maŝinoj, manufakturo kaj galanteriaj artikoj; donas ĉiujn informojn pri la polaj komerclokoj.

Nur pograndaĵoj bonvolu sendi ofertojn kun specimenoj aŭ katalogo.

Reprezentado. Perado.

Jus aperis

eldonita de Księgarnia Robotnicza (Laborista Librejo), Warszawa, ul. Wspólna 17, Polio:

Ekzilo

Rememoroj de Aleksy Rzewski.

Esperantigis kun permeso de la aŭtoro K. Domosławski.

La aŭtoro, es-ista Lodza laboristo, estis kiel fervora ano de socialista partio dum la revolucio de 1905 i. aresita de la rusa registaro kaj ekzilita Siberion. Forkurinte de tie en 1907 i. laboradis ĝis 1912 j. en diversaj urboj de Francio kaj Germanio. El tiuj tempoj devenas liaj tre interesaj rememoroj.

En nova liberiginta Polio R. estas unu el la plej amataj ĉefoj de pola laboristaro. En sia hejmurbo Łódź li estas elektita je urbestro. Estante mem Esperantisto, li varme subtenas nian movadon kaj estas elektita kiel honora komitatano de la 1-a Tuipola Esp. Kongreso.

Prezo de la 58-paĝa libreto afranke 0.50 sv. fk. aŭ egalvaloro. Por malbonvalutaj landoj 25% rabato.

Eau de Cologne

Parfumo, Tualitilo ktp.

Aug. Junker, Köln a. Rh., Hohestrasse 26, Germ.

Uzu la okazon viziti

BUDAPEST!

24. Nov. — 3. Dec. 1922

Internacia Ekspozicio

„LA INFANO“

Informoj ĉe:

Johann W. Kechlik, Berlin, N. 9, Linkastr. 25, Hamburg Paulstr. 8.

Adolf Boger, München, Olgastr. 5, Hungara Fremdultrafika kaj Ekspozicia A. S., Budapest, Vilmos-császár ut 53. I.

Idegenforgalmi

Grandkomercejo de Bildokadroj

Otto K nittel & Cie. Freiburg i. Br. (Germanio) Wenzingerstr. 42.

Plej bona aĉetate por orumitaj kaj poluritaj bildokadroj.

Eksporto ĉiulanden. — Oni petu specimenojn kaj prezojn.

Reprezentantoj serĉataj.

Anoncetoj.

Familiaj anoncetoj senpage. Alialanoncetoj (nur akceptataj por minimume du sinsekvaj enpresoj) kostas po du enpresoj kaj po 20 vortoj (krom unuadreso) 0.20 dol., 0.40 ĵeno, 0.80 ĥfl., 1 ĥrd. kr., 1 ĥll., 1 sv. fk., 1 pes., 2 franc. aŭ belg. fk., 2 esk., 3 ĥr., 6 kc., 7 ĥmk., 10 ĥim., 18 ĥlvoj, 18 ĥvoj, 200 gmk., 200 ĥung. kr., 1000 pmk., 8000 aĝstr. kr. Ĉiu povas pagi per lu sin al la nomitaj valutoj, sed laŭ la aktuala kurzo de sia propra valuto, aŭ 5 stamp. resp.-kup. Anoncetoj, kies valuto ne estas nomita, povas pagi egalvaloron de 2 franc. fk. Ĉe rektaj abonantoj ni deprenas la pagon por anoncetoj laŭdezire de la abonanto, de aliaj ni enpresas anoncetojn nur post antaŭpago. — Anoncetoj devas aŭten 10 tagojn antaŭ publikigo. — Aliajn anoncetojn ni akceptas nur de 1000 kr. aŭ pli, polajn de 100 mk. aŭ pli.

En specialaj aŭ eksterlandaj numeroj specialaj prezoj.

LUZICAJ SERBOJ estas petitaj korespondadi kun Svetislav Petrovič, instruisto en Ohrid, Serbio (Jugoslavio). La nomito deziras aĉeti la libron „Kraljevi Marko“ de M. Abesgus. La havanto bonvolu ĝin sendi kaj postuli rekompencan.

KONTRAŬ 10 DOLAROJ aŭ 10 svisaj frankoj mi sendas kompletan serion da rumana kronada poŝtmarko, eldonita kun kronado de rumana reĝo. Adalbert Toader, Teluș-gara, Rumanio.

ARKITEKTINĜENIERA STUDENTO por ebligi sian studadon petas kion ajn komlecon; prealagas presaojn pro la hungara valuto malpli kostajn ktp. Samideanoj subtenu min per laboradon! Johano Tomán, Budapeŝt IX., Gát str. 25 1/8.

EKKRIO. Juna 22-jara filzulo, akademia skulptur-kaj pentristo petas usonan samideanon pruntekoni kiel pruntaĵon aŭ hipotekon 20 dol. (ĉ. 100 000 gmk.) por ebligi 6 monatan restadon en resanejo. Mi inklinas al ĉia ekvivalento: okaze de pluraj proponoj mi sciigos. Ofertojn sub „Ekkrio“ bonvolu direkti al la redakcio de „Esp. Triumf.“ en Horrem-Köln.

INĜENIEROJ-ARKITEKTOJ! Kiu el vi senprokraste interkorespondadas kun mi pri konstruaĵoj el argilo? J. Grünthal, Haapsalu, Estonio, postk. 15.

GRAVA INFORMILO por ĉiu korespondanto kaj kolektanto BES-a Adresaro. Nova, kvara eldono. Prezo 1.50 sv. fk. Por germanoj kaj malbonvalutuloj 150 mk. afrankite. Tuja sendado post pago. Havebla ĉe Esp. Eldonejo Butin & Jung, Godesberg (Germ.).

Korespondo kaj Interŝanĝo.

Peter Thomaser, Villach, Völkendorferstrasse 41., Aŭstrio, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn laŭ mankolistoj aŭ nombro kontraŭ nombro, kaj poŝtmarkojn ilustr. kun samideanoj el ĉiuj landoj.

Kiu sendos al mi 50—100 bonajn poŝtmarkojn sialandajn, ricevos samkvanton de Germanio. Ankaŭ donas librojn. Nedemandinte sendu pro ŝpero. Validas ĉiam. Hermann Remers, Düss. I lorf, Luisensir. 97, Germanio.

S-o Bazilo Averin, 6 uĉ. 3 Bakalda, N-o 30, Astrahan (Rusujo), deziras korespondi.

S-o Henri Trommelen, Boerheestraat 65, Antwerpen (Belgujo), deziras korespondi per poŝtmarkoj kun ĉiuj landoj.

Deziras korespondadon kun polcistoj ĉiulandaj per poŝtkartoj ilustr. kaj leroj. Paul München, Breslau VI, III. Polizei-Bereitschaft, Westend-Kaserne. (Germ.)

S-o Jozef Wauters, De Coninckplein 7, Antwerpen (Belgujo), deziras korespondi kun alilandanoj per ilustr. poŝtkartoj aŭ leroj.

S-o Francisko Kéder, Ujpest, Nyár u. 73, Hungarlando, deziras nur poŝtmarkojn interŝanĝi, sed nur kun seriozaj filatelistoj ĝis 300 pecoj!

S-o Henri Timp, Van Montfortstraat 35, Bergerhout, Antwerpen (Belgujo), deziras korespondi kun artistoj, muzikistoj en ĉiuj landoj.

Mi deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kaj poŝtkartojn kun ĉiuj landoj. Josef Pompl, Weimann-Sanatorio, Pockau-Aussig (Ĉeĥoslovakio).

A. Tjutekin, Kudrovaia d. 41., Astrahan, Rusl., deziras korespondi kun ĉiulandaj gestudentoj pri ĉiuj temoj.

Aĉeton kaj interŝanĝon de poŝtmarkoj kun ĉiuj landoj deziras laŭ Michel, Senf. Kürzl, Yvert: „Esperantujo“, Wien VIII, Lenaugasse 11, (Aŭstrio).

Rudolf Reeh, Kaiserstr. 3; Alois Dörner, komercisto, ambas Trautenau, Bohemlando, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj (bfl.) interŝanĝas poŝtmarkojn, sigelmarkojn kaj papermonon.

Franz Fockarich, instruisto, Pilnikau, Ĉeĥoslovakio, serĉas gekorespondantojn por siaj kursoj (60 partoprenantoj) — plenaĵuloj komencantoj — komence per poŝtkartoj.

S-o Vaclav Krel, studento, Hradec Králové, Chmelová, 357, (Ĉeĥoslovakio), deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj (bfl.) kaj leroj kun la tutmondo, interŝanĝas poŝtmarkojn.

Junaj Esperantistoj, kiuj volas korespondi kun junaj Holandaj lernantoj, bonvolu skribi al s-o J. P. Klerks, Egmond Hoef, Holando. Interŝanĝas ankaŭ poŝtkartojn.

Mi deziras korespondi kun gesamideanoj el ĉiuj landoj (escepte Francujo) per ilustr. poŝtkartoj kaj interŝanĝas poŝtmarkojn. Bonnard Maurice, 16 Bd. Gallieni Quinay sous Bois Set O, Saint Quen, Francujo.

A. Rothe, Lugau i. Sa. (Germanujo), deziras korespondi pri ĉiuj temoj; interŝanĝas poŝtmarkojn kaj fotografajojn kun la tuta mondo.

Konstanty Chmielewski, libristo, Bydgoszcz (Polio), Kordeckiego 1a, volas interŝanĝi polajn poŝtmarkojn pogrande (de 200 ĝis 1000 aŭ pli) laŭ katalogo. Sendu nur nedifektajn.